

# Eŭropa Bulteno

Novembro 2012, Numero 121

## LABORPLANO DE EEU POR 2013

Dum la asemblea kunveno de EEU en Galivo oni akceptis laborplanon de EEU por la jaro 2013. Jen ĝi en mallonga formo por ke la landaj asocioj povu sekvi la planon kaj mem kontribui al ties realigo.

1. Ellaboro de 3 novaj poreŭropaj projektoj kaj transdono al la koncernaj fondaĵoj inter kiuj por Comenius pri komuna eldono en pluraj lingvoj de la libro de Tibor Sekelj „Kumeŭaŭa – la fino de ĝangalo“.
2. Kontaktado de instancoj en Kroatio kun la iniciato organizi interregistaran konferencon pri „Edukado en lernejoj pri eŭropa konscio“.
3. Redaktado kaj eldono de konferenclibro pri la Eŭropa konferenco »Kia estus Eŭropo nun, se EU neniam estus fondita?« okazinta en Triesto (Italio).



4. Realigo de la unua parto de la eŭropa projekto „Lingvo.info“ laŭ la akceptita plano de la projekto (4 kunvenoj de partneroj, distribuado de taskoj kaj kontrolo de progreso, administrado kaj manaĝorado de la tuta projekto, financa kaj raporte ktp.).
5. Plua okupiĝado pri la popoliniciato ĉe la Eŭropa Komisiono kun propono akcepti tekston de komuna eŭropa himno, kiun EEU jam uzas en siaj eŭropaj aranĝoj, en neŭtrala lingvo Esperanto. Prepari kampanjon pri eŭropa himno inter korusoj de Eŭropo.

6. Pluaktivi en Platformo por multlingvismo de Eŭropa Komisiono kune kun E@I, kiu laŭ la propono de EEU devus fariĝi nova membro de la Platformo post la akcepto far ĉiuj membroj.

7. Prepari kaj eldoni libron pri la stato de Esperanto-movado en Eŭropa Unio kiel kolekto de 27 artikoloj pri la movado en 27 EU-landoj, kiujn ni aperigis en Eŭropa Bulteno inter 2010 kaj 2012.

8. Organizo de podia diskuto kadre de Ekonomia Forumo en Krynica (Pollando) komence de septembro 2013 kaj aktiva partopreno en la Forumo kun aparta atento al informa agado.



9. Partopreno de EEU-representantoj en proksimume 10 diversaj internaciaj neesperantistaj konferencoj kiuj traktas lingvajn kaj identecajn temojn.

10. Prelegoj kaj partopreno de la estraranoj de EEU en deko da konferencoj kaj kongresoj de landaj asocioj de EEU.

11. Disdono de letero-deklaro al membroj de Eŭropa Parlamento verŝajne kun jena enhavo:

- a) invito al eventuala konferenco en Kroatio pri edukado por eŭropa konscio,
- b) informo pri la eŭropa iniciato kaj teksto por eŭropa himno.

12. Iniciati agadojn far Landaj Asocioj okaze de Eŭropa Lingva Tago (26-a de septembro): publikaj prelegoj pri lingva stato en Eŭropo, ekspozicioj pri Esperanto, lingvaj festival(et)oj, aperigo de nacilingvaj libroj – tradukoj al malpli grandaj lingvoj...

13. Iniciati agadojn far landaj Asocioj okaze de Tago de Gepatraj lingvoj (21-a de februaro): Disvastigo de konkludoj de Eŭropa Platformo de Civitanasocioj por Antaŭenigo de Multlingveco, per prelegoj kaj rondaj tabloj.

14. EEU-partopreno en aranĝoj de diversaj internaciaj kaj eŭropaj organizoj kiel UEA, TEJO, SAT, AVE, EDE, AEK, ILEI ktp.

15. Redaktado kaj aperigado de Eŭropa Bulteno (11 numeroj sur averaĝe 12 paĝoj) en elektronika formo kaj aperigata en nia EEU-paĝaro kaj en la paĝaro gazetejo.org

16. Regula kompletigado de informoj en la retpaĝaro de EEU: [www.europo.eu](http://www.europo.eu)

17. Organizo kaj preparo de Jarasembleo de EEU en Nitra (Slovakio) dum SES kaj de du estrarkunvenoj (en Nitra kaj en Zagrebo).

Zlatko Tišljarić

## **JUĜO PRO LA ITALA PLENDO PRI LINGVA DISKIMINACIO**

La 27-an de novembro 2012, la Kortumo (Granda ĉambro) de EU proklamis juĝon en la kazo C-566/10 P, Italio kontraŭ Eŭropa Komisiono. En tiu proceso Italio apelaciis kontraŭ antaŭa juĝo de la Tribunalo de la 13-a de septembro 2010, kiu pravigis la Komisionon en proceso (T-166/07) per kiu la Itala Respubliko estis klopodinta nuligi tri dungokonkursojn de EPSO (la personar-selekta oficejo de EU, kiu laboras sub kontrolo de la Komisiono) kies plena alvoko estis publikigita nur en tri el la oficialaj lingvoj de EU kaj kiuj postulis de la kandidatoj la scipovon de unu el tiuj lingvoj. Nome temis pri la angla, la franca kaj la germana lingvoj. La konkursoj estis EPSO/AD/94/07, EPSO/AST/37/07 kaj EPSO/AD/95/07.

La Helena Respubliko kaj la Litova Respubliko intervenis en la proceson subtene al Italio. La Kortumo pravigis Italion kaj nuligis la atakitajn konkursojn, sed ankaŭ diris ke la jam atingitaj rezultoj de la konkursoj ne estas tuŝendaj.

Se temas pri la publikigo de la konkursoj en limigita nombro da lingvoj, la Komisiono defendis la praktikon de EPSO dirante ke tiu lingve limigita publikigado estis necesa pro la kresko de la laborkvanto okaze de la aliĝo de novaj membroŝtatoj al EU dum la jaroj 2004 kaj 2007 kaj ĉefe pro la plimultiĝo de la oficialaj lingvoj, dum EPSO ne havis sufiĉan tradukkapablon.

La Kortumo tamen rekonis ke tia lingve limigita publikigpraktiko ne estis ligita kun la aliĝoj, ĉar ĝi daŭris plu, kaj ĉar la konkursaj alvokoj estas parte ripetataj tekstoj kies tradukado ne estas nepra obstaklo. Cetere, ĉiukaze praktikaj problemoj pri tradukado devas esti komparataj kun la rajto de ĉiuj civitanoj de la Unio informiĝi pri la konkursoj laŭ la samaj kondiĉoj.

Se temas pri la postulo ke ĉiuj kandidatoj scipovu almenaŭ la anglan, la francan aŭ la germanan, kaj la decido ke la fremdlingva parto de la ekzamenoj okazu en unu el tiuj tri lingvoj nur, la Kortumo agnoskis ke konkursaj alvokoj povas prave postuli la scipovon de iuj lingvoj, se tio estas necesa por la posteno pri kiu temas. Tamen la juĝisto devas povi kontroli la pravecon de tia postulo, sed en tiuj tri alvokoj mankis ĉia klarigo pri tia neceso. Do la Tribunalo malprave agnoskis tute glate ke "estas klare ke" tiuj tri lingvoj estis bezonataj pro administraj kialoj.

La Kortumo do nuligis la antaŭan juĝon de la Tribunalo kaj decidis ne resendi la kazon al la Tribunalo sed mem findecidi pri ĝi, nuligante la tri konkursajn alvokojn pro tio ke ili malrespektas:

- artikolon 1, paragrafo 2, de la aldonaĵo III de la Statuto de la personaro de EU, ligite kun artikolo 5 de la reglamento n-o. 1 (pri la lingvoj de EU), kaj
- la principon de ne-diskriminacio pro lingvo, proklamitan en la artikolo 1-kvin de la Personara Statuto.

Guido Ricci

## KAEST EN MODRA/HARMONIA (SLOVAKIO)



La deka jubilea Konferenco por Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko (KAEST) okazis inter la 15-a kaj 18-a de novembro 2012 en slovaka urbeto Modra/Harmonia proksime de Bratislavo. Partoprenis 45 konferencanoj el 11 landoj.

Kun tre riĉa programo, ŝtopita per prelegoj kaj trejnkursoj. La ĉeftemo estis apliko de modernaj metodoj en pedagogio kaj la kunorganizanto apud la ĉeforganizanto E@I estis ILEI.

Partoprenis do la tuta eŭropa parto de la estraro de ILEI kaj pluraj aliaj pedagogoj. Sed oni traktis ankaŭ tradiciajn temojn pri la fakaj vortaroj kaj gazetoj. La novaj gvidantoj de ISAE kaj ties revuo diskutis pri tio ĉu plu eldoni paperan version kaj konkludis ke la Scienca Revuo aperos plu 4-foje jare sed nur en elektronika formo, sed oni eldonos jarkolekton ankaŭ en papera formo. La plej multnombraj aranĝoj estis dediĉitaj al vikipedio, trejnado de novaj kaj malnovaj kunlaborantoj kaj diversaj prelegoj pri ĝi. Vespere oni ankaŭ povis spekti filmojn kaj prelegojn neligitajn al la konferenca temo kaj celoj. Interalie okazis interesa prelego pri la agado de EEU kun aparta prezento de la Triesta konferenco, far Jozefo Reinbart.



Min efektive surprizis multaj novaj kaj junaj fakuloj kiuj transprenis la stirradon pri sciencaj aferoj. Kiam mi partoprenis la lastan fojon antaŭ kvino da jaroj, la konferencanoj estis ekskluzive pliaĝuloj. Nun viglis la konferenco en kiu gvidan pozicion havis pli ol 10 gejunuloj. Ankaŭ mi lernis pri vikipedio kaj vikimedia en seminario kiun gvidis Michal Matušov, kiu estas krome prezidanto de slovaka vikimedia fondaĵo (neesperantista), kaj ĝi transprenis aŭspicion super

la konferenco.

Kiel dirite, pro la ĉeftemo okazis deko da pripedagogiaj prelegoj kaj eblis aŭdi ĉion pri la aktualaj instrumentoj kaj iliaj karakterizoj (tiusence prelegis Zsofia Korody, Petro Chrdle, Stano Marček, Stefan Mac Gill, mi kaj kelkaj aliaj). Elstaris prelegoj de Bart Demeyere pri lia metodo plifaciligi memoradon kaj pri reta supervortaro (reta paĝaro per kiu eblas atingi 10 diversajn esperantajn retajn vortarojn), de Melanie Maradan pri la agado surkampe de fakaj terminaroj kaj de Konstantin Tihomirov pri eŭropaj kaj slavaj lingvoj.

E@I (Petro Baláž, Katka Noskova kaj Dorota Rodzianko) bonege prizorgis ĉion de konferencejoj ĝis loĝado en sufiĉe luksa universitata hotelo por vere konvenaj prezoj. La sekva KAEST okazos same novembre post du jaroj ie en Slovakio.

Zlatko Tišljarić

## **NOVA ARMILO KONTRAŬ LA KRIZO DE LA GREKA E-MOVADO**

Longe mi foliumis kaj refoliumis la novan, imponan, greklingvan verkon de Kostas Kiriakos. Mi deziras komuniki al la amikoj, la anoj de niaj E-grupoj mian grandan ĝojon kaj fierecon pro la valora nova produkto de la daŭra laborado de Kostas Kiriakos, kiu en la lastaj jaroj estas la kerno, la animo mem de la malfortiĝinta greka E-movado. Homo kapabla, iniciatema, sinoferema, modesta, precipe obstine kredanta al sia bona celo, Kostas Kiriakos, preskaŭ tute senhelpe, propraefike tenas vivanta, ĉeestanta, preskaŭ aktiva nian nefortan movadon.

Longe vagante en la mirinda mondo de la interreto li kontaktas kun multaj homoj, kun la sennombraj siaj amikoj, ĉie en la mondo, li ĉerpas kaj disdonas informojn, interesajn novaĵojn pri eventoj, atingoj, programoj, li respondas al ĉiuj, li helpas, li informas nin pri ĉio, pere de niaj facebook-lokoj. Estas sciata, ke K. Kiriakos, post longa, ege peniga laboro, preskaŭ tute sola kreis la grandiozan retpaĝon de nia greka E-asocio, kiun senĉese, zorgeme pliriĉigas kaj plibonigas.

Nun, okaze de la 125-jara datreveno, li decidis prezenti en libro parton de la retpaĝa materialo lerte kaj artisme kombinita kun riĉa nova materialo, freŝa, juneca, entenanta eĉ la plej lastajn interesajn informojn rilate al la internacia E-aktivado. Temas pri 400-paĝa alloga enhavo, pri aspekto belega, pri verko grava.

Kostas laboras ne celante, ne dezirante ies rekonon, li kompreneble scias ke pri tiu ĉi lia nova verko interesiĝas tre malmultaj personoj. Li verkas ĉar li kredas al posteuloj, ĉar tre prave li estas certa, ke iam en pli bonaj jaroj nepre estos multaj junaj Grekoj, kiuj ne restos indiferentaj por la nobla ideo kiu nin konkeris.

Por tiuj venontaj grekaj esperantistoj restos por ĉiam valoraj helpiloj kaj gvidiloj la gravaj verkoj de Kostas Kiriakos.

Spiros Sarafian

## **ESPERANTO-PONTO EN BYDGOSZCZ**

Okaze de 125 Jaroj de Esperanto la 3-an de oktobro 2012 Konsilio de Urbo Bydgoszcz (Pollando) decidis honorigi la la gravan datrevenon per nomigo de ponto-kostruaĵo trans rivero Brda en Bydgoszcz "Most ESPERANTO". La 27-an de oktobro 2012 okazis oficiala starigo de du tabuloj kun surskribo "Most ESPERANTO" je ambaŭ flankoj ĉe la Rivero Brda en Bydgoszcz.

La ceremonion gvidis en Esperanto kaj pola lingvo Lech Zagloba - prezidanto de la Urba Komisiono pri Kulturo kaj Edukado, ĉar li mem estas esperantisto de pli ol 40 jaroj. Festparolis Stefan Pastuszewski - prezidanto de Komisiono pri Stratnomigo en la urbo Bydgoszcz, kiu substrekis, ke Ponto Esperanto estas ankaŭ Ponto de interkompreniĝo inter homoj de diversaj nacioj, lingvoj kaj kulturoj, kaj dankis al Esperanto-organizaĵoj en Bydgoszcz pro ilia aktiva promocio de la urbo Bydgoszcz en 125 landoj de la mondo. La

ceremonion partoprenis kelkdek personoj el Pollando kaj gastoj el Germanio, Kazakio, Rusio kaj Senegalio. Sube kelkaj fotoj de la ceremonio ĉe nova Ponto - Esperanto. Pola Televido (TVP) - filio en Bydgoszcz en regiona tagraporto "Zblizenia/ Proksimigoj" dum pli ol 2 min. raportis pri la evento, kion oni povas spekti uzante ligilon:

<http://www.tvp.pl/bydgoszcz/informacja/zblizenia/wideo/2710-g-1830/8931251>

La informojn kun la fotoj pri Ponto Esperanto en Bydgoszcz oni sendis en Esperanto kaj pola lingvoj al pli ol 8000 retadreso en 125 landoj de la mondo. Ili estis senditaj de sekvontaj organizoj kiuj en Bydgoszcz aktivas pri Esperanto:

Internacia Centro pri Kulturo kaj Turismo  
Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo  
Internacia Klubo "ESPERANTOTUR"  
Internacia Klubo de Senjoroj  
Pola Esperanto Asocio - Filio en Bydgoszcz  
Klubo Esperanta Amiko en Bydgoszcz

Stani Rynduch

## SLOVAKE.EU MALFERMAS NOVAJN PORDOJN

La 30-an de oktobro Petro Baláž kaj mi partoprenis malfermon de la Konstanta konferenco por Slovakoj vivantaj en eksterlando 2012 (kiu okazas ĉiun duan jaron) en kiu parolis sinjoro Dušan Čaplovič. Mi mallonge parolis kun li kaj dankis al li pro lia subtena letero. Li diris, ke li legas miajn raportojn.

Mi donis al li kelkajn materialojn kaj akcentis al li raporton de Angela Telier pri S2L. Li diris, ke li legos la materialojn. Kun lia asistanto ni interkonsentis, ke ni aranĝos mallongan renkontiĝon kun la ministro Čaplovič kaj poste mi kun Petro renkontiĝos kun kompetentaj estroj de departamentoj, kun kiuj ni povos paroli pri antaŭenigo de Slovake.eu kaj provi rekomendi al lernejoj efektiviĝi eksperimentojn en elementaj lernejoj similajn al S2L. La sekvan tagon mi prezentis al Slovakoj vivantaj en 20 landoj modelan multlingvan portalon de EU [www.slovake.eu](http://www.slovake.eu) (retejo de E@I por lerni la slovakon).



Matene ni en nia ministerio havis 25-minutan prezentadon de Slovake.eu al 115 honoraj konsuloj de Slovakio en 70 landoj, kiuj partoprenis konsilkunvenon, kiu okazas ĉiun kvinan jaron, kaj ni invitis ilin al kunlaboro helpante nin aldonadi pliajn lingvojn (de landoj en kiuj ili oficas), ke civitanoj de tiuj landoj povu legi en siaj lingvoj informojn pri Slovakio kaj se ili estos motivitaj, povos lerni la slovakon. Ili montris intereson pri la portalo kaj ni esperas, ke ni komencos kun ili la kunlaboron.

Nia prelego okazis tuj post prezentado de Robert Fico, ĉefministro de Slovakio, kun kiu mi mallonge parolis pri Slovake.eu, kiun ni volas evoluigi pere de variaĵoj de la portalo en ĉiuj 25 lingvoj (inkluzive de la kroata kaj Esperanto) de EU, ĝis nia prezidanteco en EU en la 2-a

duonjaro de 2016, kiam ni povos prezenti al EU plenfunkciantan multlingvan portalon por informi civitanojn popularforme pri okazaĵoj dum nia prezidanteco. Li subtenis nian ideon kaj konsentis, ke ni daŭrigu en la evoluigo de Slovake.eu.

Ni ĝojis, ke ni havis dum tiuj ĉi du eminentaj eventoj eblecojn prezenti Slovake.eu kaj informi pri ĝi kaj tiamaniere pliigi ĝian uzadon kaj havi la eblecon informi ankaŭ, ke ni havas tiun portalon dank al 10-jara portalo lernu.net por lernado de Esperanto en 38 lingvoj. Krome ili vidis, ke Esperanto estas inter la 8 lingvoj de la nuna portalo. Petro donis al ili DVD-jn kaj informfaldfoliojn.

Jozefo Reinart

## LA 20-a INTERNACIA ESPERANTO-SEMAJNO DE LA KULTURO KAJ TURISMO

Kutime la unua oktobra semajno estas rezervita por la tradicia E-aranĝo en Hispanio. La ĉi-jara jubilea 20-a E-Semajno okazis en la ĉemara urbo “Cambrils”, situanta 16 kilometrojn sude de Tarragono. La aranĝon organizas grupeto da entuziasmaj esperantistoj el Barcelono kaj Sabadell sub la gvido de Luis Serrano Pérez. Dum la aranĝo li ankaŭ prizorgas libroservon.



Ĉi-foje la aranĝo atingis rekordan nombron da partoprenantoj. Alvenis 144 gesamideanoj el 13 landoj. Ni loĝis en granda 4-stela hotelo “Cambrils” en proksimeco de la plaĝo, kiu etendiĝas je 18 kilometroj laŭ la maro. Multaj profitis la posttagmezajn paŭzojn por promenadi laŭ ĝi kaj ankaŭ baniĝi en Mediteraneo. La vetero en tiu ĉi sezono estas ĉiam agrable varma. Ankaŭ la hotela naĝejo estis ĉiutage plenplena de hotelgastoj. La hotelo disponas

pri 400 ĉambroj. Ĉiuj estis okupitaj. Oni aŭdis krom la franca, plejparte la rusan lingvon. Iuj gastoj scivolis pri Esperanto. Nia aranĝo estis la lasta de tiu-ĉi sezono dum kiu la hotelo funkciis. La prezoj estas malpli altaj ol dum la someraj monatoj.

La dimanĉan inaŭguron ĉeestis kaj bonvenigis nin la urbestro de “Cambrils” kaj aliaj du membroj de la urbestro. Nome de UEA salutis la ĉeestantaron Barbara Pietrzak el Pollando. Ŝi pli poste prelegis pri la 125-a centjariĝo de la Unua Libro. La saman temon oni ankaŭ pritraktis en debato, kiun gvidis Luis Serrano. Ĉiutage (krom la tuttaga ekskurso) Rodica Todor el Rumanio animis kun granda sukceso la E-kurson. Pro ŝiaj profesiaj psikologiaj spertoj la kurso fariĝis interesa kaj sekvis ĝin multaj entuziasmaj lingvoŝatantoj. Ŝi eĉ havis

ideon krei komunan libron pri la temo: "Kial restas multaj personoj ĉiamaj komencantoj kaj kiamaniere ni povus solvi tiun fenomenon?". Gian Carlo Figliera el Italio allogis prezentis la verkon de Victor Hugo "La Belulino, la Monstro kaj Nia Damo". La geedza paro Michèle kaj Hubert el Belgio klarigis kiel plibonigi sian esperanto-lingvoscion per prelegoj. Per bildoj kaj komentario ili rakontis pri siaj spertoj en Esperantujo. Josée Boccadifuoco el Francio rakontis kortuŝan biografion de siaj gepatroj. Temis pri "Rememoro de milito". Profesoroj Júrate Buŝiene kaj Aldis Buŝs el Latvio prezentis serion da prelegoj. Ili konigis al ni informojn pri baltaj landoj: Litovio, Latvio kaj Estonio. Pri sia lando ili montris film-fragmentojn el kultura kaj festa vivo kaj rakontis pri sistemo de instruado en Latvio. Krome ni eksciis kio estas hipofeo - planto kun oranĝaj beroj enhavantaj multe da vitamino C. Manfred Sona el Germanio enkondukis kaj klarigis interesan temon: "Baza enspezo senkondiĉa". Ĝi estus bona rimedo por forigi malriĉecon kaj doni kondiĉojn, por ke ĉiu povu vivi digne. Lia prelego instigis al vigla diskutado. La prezidanto de HEF (Hispana E-Federacio) José Antonio del Bario rememorigis gravajn hispanajn esperantistojn de antaŭ la hispana intercivitana milito. Pro la ĉiutaga vespera hotela programo ne eblis okazigi kelkajn el niaj vesperaj programeroj. Tial iuj gesamideanoj pli frue enlitiĝis, aliaj profitis dancadon, spektis flamenkan prezenton kaj magiaĵojn. Tamen ni ĝuis la du interkonajn vesperojn kun hispana "Cava" - ŝaŭmvino kaj ankaŭ vesperon kun "cremat" (bruligita rumo kun aldonaj spicaĵoj). Nur bedaŭrinde la folkloro ensemblo "Montjuic" pro certaj miskomprenoj ne venis ĝojigi nin per siaj kantoj. La hotelo provizis disko-muzikon kaj kontentigis nin per kelkaj havanaj melodioj.

La premio "Ada Sikorska" estis ĉi-foje aljuĝita al Vilhemo Lutermano, kiu multe laboras por Esperanto. Li organizas retforumon MAS, redaktas Esperanto-version de "Le monde diplomatique" kaj eldonas E-librojn. Li loĝas en Kubo kaj pro tio li ne povis transpreni la premion persone.



Kutimaj (dum tiu ĉi aranĝo) estas unu tuttaga kaj du duontagaj ekskursoj. Dum la unua duontaga ekskurso ni vizitis la E-muzeon en "Pau d'Ordal" kaj la vinkelon "Massana". Tie ni gustumis kaj povis aĉeti diversspecajn vinojn. La dua duontaga ekskurso celis la monaĥejon de "Escornabou". Ĝi estis plurfoje renovigita kaj nun servas kiel muzeo. Apuda rigardejo donis eblecon observi belan kaj vastan ĉirkaŭaĵon. La tuttaga ekskurso estis ĉi-foje iom nekutima. Unue ni vizitis planetarion en la urbo "Castelló".

Poste atendis nin surprizo. Ĉiuj 90 ekskursantoj estis invititaj al la hispana specialaĵo "paella". Preparis ĝin je niaj okuloj s-ro Conejero en sia hejmo. La afabla akcepto fare de la familio estis por ni vere agrabla surprizo. Ni ankaŭ gustumis kelkajn fruktojn el la ĝardeno de la gastigantoj.

La Semajno estis sukcesa, la vetero favora, hotela manĝo abunda, la etoso gaja kaj amika. Koran dankon al niaj fervoraj organizantoj kaj kunhelpantoj pro la bona laboro, kiu ebligis al ni ĉeesti tiun ĉi ŝatatan aŭtunan eventon. Ĝis revido venontjare denove en Katalunio.

Liba Gabalda



## RETEJO „LA VOJAĜO“

Mi ĝojas informi vin, ke la retejo La Vojaĝo <http://www.vojagxo.info> estas komplete renovigita!

The screenshot shows the homepage of 'LA VOJAĜO'. The header features the text 'TUTMONDO PER ESPERANTO' and 'LA VOJAĜO' in large letters. A search bar is on the right. Below the header is a navigation menu with items: Ĉefa, Blogoj, Kluboj, Fotoj, Artikoloj, Personoj, Katalogo, Forumo, Gastoservo, Trasiberio, Pri retejo. The main content area has three columns. The left column has 'HOTELOJ BILETOJ VIZOJ' and 'La Lastaj Novajoj'. The middle column has an article 'Mia longa vojaĝo al la kongresa lando Vjetnamio' with a photo of a man and a text snippet. Below it is 'MAKS-2013, aerekspozicio' with a photo of flags. The right column has 'KARAVANO-2013' with a photo of a caravan and a list of destinations: Aventura, Beletro, Bilettoj, Brazilo, Britio, Ĉeĥio, Ĉinio, Danio, Estonio, Eŭropo, Feroo, Insularo, Fervojo, Flughaveno, Flughavenoj, Hanojo, Hostaloj, Hoteloj, Indonezio.

Nun vi povas aliĝi al la retejo, krei privatan kaj komunan blogon, alŝuti fotojn, krei albumojn, diskuti en forumo. Krome estas renovigita kaj plibonigita gastoservo! Aldone en la retejo aperis katalogo de hoteloj, hostaloj, manĝejoj kaj aliaj porvojaĝaj bezonoj! Bonvenu aliĝi kaj partopreni.

Neniu parolado pri la movado - nur praktika uzado de la lingvo!

Trampo

## NOVJARA FESTO EN GREZIJONO

Tradicie, la Kulturdomo de Esperanto organizas jarfinan renkontiĝon en sia Kastelo de Greziljono. La festo, taŭga por familioj, ĉiujare plezurigas homojn per bona etoso, festa regalado kaj ĉarma kadro. Ni invitas vin aliĝi, vizitante la retejon de la Kulturdomo <http://gresillon.org/jarfino>.

Por tiuj, kiuj (ankoraŭ!) ne konas la Kastelon situanta en la bela Anĵua regiono en Francio, ĝi reprezentas de 1952 komunan renkontiĝan lokon por ĉiuj esperantistoj. Ni instigu vin malkovri aŭ reviziti tiun belan parton de Francio, kaj tiun heredaĵon de la esperantistaro por esti parto de ĝia vivo kaj kunaganto en ĝia disvolvo. Tie okazas staĝoj, renkontiĝoj, kursoj, festoj la tutan jaron, kaj specife ni deziras ebligi al ĉiuj celebri en amika rondo la novan jaron.

Konsciaj pri neceso limigi la kostojn por ebligi la plimulton profiti Esperantiajn eventojn, ni aranĝos veturadon, varmigis komfortajn ĉambrojn kaj preparos por vi bongustegajn manĝojn, kaj certas ke tiel multaj profitos agrablan, ĝojigan renkontiĝon denove ĉi jare.

Pierre Soubourou - Ŝtonĉjo

## LA PROJEKTO EUNOM FINIĜIS



Ni jam skribis dufoje pri la projekto EUNOM en kiu kunlaboris deko da eŭropaj universitatoj rilate lingvojn en EU. En ĝi partoprenis ankaŭ universitato el Belgio Erasmus Hogeschool kiun reprezentis esperantistino Kristin Tytgat kaj en kelkaj kunsidoj de la projekto partoprenis krom ŝi ankaŭ kelkaj aliaj reprezentantoj de EEU (Z.Tišljar, J.Derks kaj F.Witdoeckt).

La fina konferenco okazis la 18-an de oktobro 2012 en Bruselo kaj oni resumis la laboron. Jen kion pri tio diras Kristin:

- La celo de la reto EUNOM de dulingvaj universitatoj en Eŭropo estis dum tri jaroj: ekkoni unu la alian por poste komune aŭ kun kelkaj partneroj lanĉi esplorprojekton pri multlingveco.
- Ekzistas presita raporto pri la projekto en la angla, kaj en elektronika formo. La raporto nomiĝas "Globalisation, Modernity and Language: new perspectives on language in education. The EUNOM Report". (Tutmondigo, moderneco kaj lingvo: novaj perspektivoj por lingvoj en edukado. EUNOM-raporto)
- Vi povas trovi la enhavon de la tuta konferenco de la 18a de oktobro en <http://taalkunde.ehb.be/eunom/papers>.

Zlatko Tišljar

## E-KONGRESO EN GRANADO

Se la majaoj pravis, kaj la mondo finiĝos la venontan 21-an de decembro, kiu estos la lasta kongreso de Esperanto, kiun vi povos ĉeesti? Sciu, ĝi okazos en la verŝajne plej bela urbo de Andaluzio: GRANADO.

Andaluzia Esperanto-Unuiĝo okazigos la 17-an Andaluzian Kongreson de Esperanto en Granado dum la semajnfino la 15-a kaj la 16-a de decembro. Se vi neniam ĉeestis ĉi tiujn kongresojn sciu, ke ĝi estas renkontiĝo de la andaluzia esperantistaro, kaj ankaŭ de aliaj lokoj. Dum ĝi ni praktikas la internacian lingvon kaj krome ni parolas pri kiamaniere disvastigi pli efike esperanton en Andaluzio, kompreneble ĉi ĉio ene de amikeca kaj bonhumora etoso.

Pliajn informojn vi trovos ĉe la blogo de nia asocio

<http://andaluciaesperanto.blogspot.com/es/> Estas necese elstarigi la prelegon de Miguel Fernández pri la verkaro de García Lorca, noktan viziton al Alhambro kaj malgrandan

flamenkan spektaklon, pere de kiu ni provos alproksimigi la flamenkan kulturon dank'al flamenka kantisto.

Ĉu vi deziras partopreni? Tute ne hezitu. Estus konvene antaŭscii kiom da homoj partoprenos, ĉefe pro la organizado de la vizito al Alhambro kaj ankaŭ cele la rezervigon de lokoj en la restoracio kie ni organizos komunan manĝadon la 15-an de decembro. Se ni sukcesis konviki vin, plenigu la aliĝilon kiun vi trovos ĉe la blogo de la asocio aŭ en nia TTT-paĝo [www.esperantoandalucia.com](http://www.esperantoandalucia.com). Pliajn informojn vi ankaŭ povas trovi en [esperanto14@ono.com](mailto:esperanto14@ono.com)

José María Rodríguez Hernández

## LA JARO DE TIBOR SEKELJ

### KUMEŬAŬA, LA FILO DE ĜANGALO EN 30-A TRADUKLINGVO

Tibor Sekelj, pri kiu Arno Lagrange kaj Zlatko Tišljar verkis tre bonajn artikolojn en Vikipedio kaj [www.edukado.net/biblioteko/panteono](http://www.edukado.net/biblioteko/panteono), verkis la libreton surbaze de siaj spertoj kun la indiana tribo Tupari en 1949. Ĝi estis unue eldonita en 1979 en Antverpo. La enhavo havas klare edukan celon: konatigi fremdan kulturon al infanoj. Sekelj, naskita en Slovakujo, kaj poste pliparte vivanta en Jugoslavujo, estis mondvojaĝanto, lingvisto, geografiisto kaj antropologiisto.

La libro jam vivis tradukojn en 29 lingvoj. La nederlandigo estas la 30a. Ĝi havas 71 paĝojn. Por dekeljaruloj la priskribo de la Brazila praarbaro en la formo de aventuro ĉiam estas fascina kaj informriĉa. Por iel aktualigi ĝin mi sendas lastpaĝe la leganton al retpaĝoj, kiuj donas freŝdatajn informojn pri la geografio kaj popoloj de la Amazonregiono kaj priskribas la staton de minaceco de kelkaj el la tieaj plantoj kaj bestoj. Mendebla tra:



<http://www.pumbo.nl/boek/koemewawa-zoon-van-het-oerwoud>

Krom instrua kulture, la libro ankaŭ estas lingve instrua. Sekelj faras oftan uzadon de sufiksoj kiel –eg kaj –ad, nenie estas vere neatendita vortkombino aŭ surpriza bildo. La frazoj estas mallongaj. Tiuj ecoj sidigas la tekston por komencantoj kaj junaj infanoj. Por la traduko tamen la ŝabloneco de la teksto prezentas problemeton. Dum en Esperanto la teksto afable plaŭdas kaj kompreneblas, en la traduko ĝi ekhavas ian stakatecon. Pro tio post unua tradukversio gravas plurfoje relegi siajn frazojn por proksimigi ilin al pli elokventa vortigado. Pri emocioj Sekelj apenaŭ skribas. Ekzemploj estas:

- Li prenis la kaskon, kaj liaj okuloj ekbrilis, kvazaŭ du larmoj estus disfluintaj en ili.
- kaj
- Ho, la knabeto trompis nin! - ekkriis unu el la pasaĝeroj.

Estas kvazaŭ la mi-persono daŭre observas por fari iun ĵurnalistikan aŭ antropologan raporton. Tial la ĝuo de la legado pli sidas en la sinidentigo kun la lerta kaj kuraĝa indianeto, kiu en tiu praarbara medio estas fore supera al la blankaj gastoj. "Tro politike ĝusta rakonto" oni dirus nuntempe.

La plej granda forto de Sekelj kuŝas en la preciza priskribo, je infana nivelo, de la planta kaj besta vivo: kruela, se temas pri pluvivo, saĝa, se temas pri sekureco por la specio, ankaŭ ĉarma se oni havas paciencon rigardi.

Post kelksemajna tradukado nur leviĝas la demando: Ĉu mi kuraĝas proponi tion al eldonisto? Ĉar mi havis antaŭsperton pri libroj, scienc-instruaj, kiujn mi verkis, mi ne longe hezitis. Mi ne perdu tempon almozpetante ĉe eldonejoj kaj mem eldonu ĝin. Sekvas la preparado de buĝeto: Ĉu nigra-blanka? Kiu formato? Ĉu kun bildoj? Kiu eldonkvanto? Kiel reklami la verketon?

Finfine oni komprenas, ke relative granda investo necesas kaj ke neniam mi reenspezigos la kostojn. Tamen, rilate bildojn mi ankoraŭ havis bonŝancon, ĉar montriĝis, ke la tre gajaj bildoj de la desegnisto por la serba traduko estis haveblaj kontraŭ nur ducent eŭroj. La decido pri la eldonkvanto estas kompleta spekulio. Ĉu la libreto renkontos interesiĝon ekster la nederlanda esperanta medio? Mem eldonante ĝin, ĉu mi kapablos reklami ĝin? Per tvitado, fejsbuko? Duonsolvo estis trovita danke al la tekniko de "printado laŭ peto". Tio signifas, ke la presisto presas la librojn unuope. Jes oni mendas bazan kvanton, ekzemple cent ekzemplerojn, sed kiam tiu kvanto estos vendita, ĉiu plua ekzemplero estos aparte presita. Mi trovis firmaon, kiu prizorgas la perretan antaŭpresadon, presadon kaj sendadon de la libro al mendintoj, tiel nomatan distribuiston, kaj ek! Investo de 900 eŭroj por festi la jaron de Tibor Sekelj kun propra eldono. Kaj nun esperi ke multaj nederlandlingvanoj decidus ĝui la fascinantan informriĉan rakonteton!



Resumo de la enhavo:

Turisma boato sur la rivero Aragvajo en Brazilo puŝiĝas liken, kaj la ŝipanoj kaj pasaĝeroj devas forlasi la ŝipeton, en la mezo de ĝangalo. Paniko ekestas, sed jen aperas indianeto, dekdujaraĝa. Li amikiĝas kun unu el la eŭropanoj, invitas lin al ĉasiro kaj fiŝkaptado, tiel helpante la grupon de paneuloj el la nutraĵa krizo. Lia eŭropa amiko ricevas grandan respekton por la kapabloj kaj kulturo de la juna indiano. Post tri tagoj la ŝipanoj sukcesas stoki la boaton kaj ripari ĝin. La rakontanto kaj la indiano kore adiaŭas sin kaj la turisma ŝipo daŭrigas sian veturon.

Johan Derks

## EKSPOZICIO EN ETNOGRAFIA MUZEO DE ZAGREBO

La 19-an de decembro Etnologia muzeo en Zagrebo malfermos aparte preparitan ekspozicion kun objektoj kiujn Tibor Sekelj donacis al tiu muzeo. Temas pri parto de maskoj, ĉapoj kaj muzikinstrumentoj (alia parto estas en muzeoj de Senta kaj Subotica en Serbio. Kroata E-Ligo kontribuis per libroj de Tibor Sekelj kiuj estos ankaŭ ekspoziciataj.

La malfermo okazos en la muzeo (Mažuranićev trg) je la 19-a horo. Okaze de la ekspozicio la muzeo prezentos ankaŭ novan libron pri la esploradoj de Tibor Sekelj kaj lia etnografia kaj etnologia laboro en tri lingvoj: la kroata, la angla kaj Esperanto.

Zlatko Tišljarić

## VIGLA ESPERANTO-VIVO EN MAZARA DEL VALLO

Mazara del Vallo, la sicilia urbo, kiu gastigis la 79-an itala kongreson en aŭgusto 2012, plene meritas la nomon Esperanto-urbo. Post la germana Herzberg, en Italio, danke al la kunordigaj agado kaj laboro disvolviĝantaj en **Centron por Esperanto kaj Interkulturo**, aganta nome de **Itala Esperanto-Federacio** okazas grandskala kaj en si mem pionira laboro. Tre verŝajne ne plu vivas homo en la urbo, kiu ne sciis ion pri Esperanto.

Kun la fervora subteno de la urbestro, ne nur en dekoj da klasoj okazas sistema instruado de Esperanto, sed formiĝis Esperanto-Centro kun oficejo; instruistoj kaj membroj de diversaj asocioj partoprenas en informprelegoj kaj kursoj pri la lingvo. Somere kun dekoj da tuturbaj publikaj prezentoj kaj koncertoj esperantistaj artistoj suriris la urbocentran scenejon kaj la partoprenantoj de la itala kongreso kun granda amaso de lokuloj kune ĝuis la vesperajn programojn. Ŝildoj en Esperanto kaj pri Esperanto komencas aperi en la stratoj de la urbo.



En tiuj ĉi semajnoj (novembro 2012) la loĝantoj, de infanetoj ĝis plenkreskuloj, kun la gvido de Kimie Markarian (JP-GB) lernas pri sorobano. Okazis surstrataj prezentoj, publikaj informprelegoj, formalaj lernejoj kaj praktikado. Ekz. en la mezgrada lernejo de J.Grassa Kimie, kun la helpo de Monique Arnaud (FR) proponis demonstri

la uzon de sorobano al dudeko-trideko da lernantoj, sed venis al la prezo proksimume cent lernantoj. Postprezente en la sekvaj tagoj kelkaj klasoj en tiu lernejo ricevis pli profundan

eblon praktiki la uzon de la japana kalkulilo. La junuloj ĝuis lerni pri sorobano kaj mire konsciis pri la graveco de tiu kalkulilo.



Similaj prezentoj kaj informado okazis en aliaj lernejoj, kluboj; belega afiŝo de Przemek W. informas la loĝantojn pri la programoj en vitrinoj, trinkejoj kaj vendejoj de la urbo.

Post la aŭgusta kultura Esperanto-festivalo, nun lernado pri la japana kalkulilo en la praktiko pruvas, ke la internacia lingvo estas bona peranto inter diversaj kulturoj, do, valoras ĝin lerni. Kaj en Mazara ankaŭ eblas ĝin

lerni. Jam de pli ol unu jaro oficiale funkcias lernejoj Esperanto-kursoj, gvidataj de eksterlandaj volontuloj.

Nepre menciindas la nomo de la hungara Szabolcs Szilva, kiu komence dum kelkaj semajnoj volontulis en la urbo. Lin sekvis tre spertaj du instruistinoj, Márta Kovács (HU) kaj Svetlana Smetanina (RU) kiuj dum 4-5 monatoj laboregis en diversaj klasoj en la urbo antaŭ somero de 2012.



Ekde septembro Nina Pietuchowska (PL) transprenis la torĉon kaj agadas surloke ĝis komenco de decembro. En oktobro aliĝis al la teamo alia polo, Przemysław Wierzbowski kaj poste la francino Monique Arnaud kiu restos en la urbo inter la 3a de novembro ĝis la 19a de decembro kaj krom la instruado respondecos ankaŭ pri la Zamenhof-

tagaj aranĝoj kaj festoj.

Edukado.net klopodas subteni la agadon de la kolegoj, kaj la redaktoro fieras pri tio, ke krom Marta Kovacs, ĉiuj surloke agantaj kolegoj partoprenis en ŝiaj trejnkursoj en la pasintaj jaroj, estas disĉiploj de Katalin Kovacs kaj daŭre kunlaboras kun edukado.net. Ankaŭ pro tio okazis ke la entrepreno E-duKati aliĝis al la grandanima donaco de Synnöve Mynttinen kiu disponigis 500 libretojn de *Poŝamiko* al la lernantoj de Mazara. La sendadon financis Tamás Slezák el Hungario. Certe bonvenas financaj helpoj, sed kelkfoje metodikaj konsiloj, ideoj pri

poemetoj, ludoj, materialoj multe helpus la kolegojn. Vidu nian foruman parton kun tia ekzemplo.

Nia redakcio volonte ricevas kaj peras informojn pri la disvolviĝo de la laboro en Mazara, kaj kore gratulas kaj dankas ĉiujn kunlaborintojn kaj kunlaborantojn, inter ili aparte Brunetto Casini kaj Sara Spanò, kiuj estas la motoroj de la projekto kaj kiuj klopodas pri la ebligo de kontinua agado en la urbo kaj akirado de pliaj eŭropaj subvencioj por la eblo venigi pliajn instruistojn al la esperantigata Mazara del Vallo.

### Ligoj al aldonaj informoj:

Paĝo de la Centro sur **Facebook**: <http://www.facebook.com/ceimazara>

Nia kolekto de iliaj **fotoj**: <http://edukado.net/biblioteko/fotoj?al=35>

**Forumo** kie ni kolektis kristnaskajn ideojn por Mazara:

<http://edukado.net/komunumo/forumo?k=23>

Informoj, artikolo, sonmaterialo **pri sorobano**: <http://edukado.net/instrumaterialoj?iid=23452>

La raporton kompilis el diversaj fontoj: Katalin Kovats  
Fancesco Maurelli

### Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.

Finredaktita: la 30-an de novembro 2012

Redaktoro: Zlatko Tišljär

En la numero kunlaboris: Zlatko Tišljär, Guido Ricci, Spiros Sarafian, Stani Rynduch, Jozefo Reinbart, Liba Gabalda, Trampo, Pierre Soubourou, José María Rodríguez Hernández, Johan Derks, Francesco Maurelli

Kontakto: [ztisljar@gmail.com](mailto:ztisljar@gmail.com)

Retpaĝo: <http://www.europo.eu/eo/euhropa-bulteno>

